

Joh.. H: Petersen,
Lingvo internaci'

Lingvo internaci',
ĝin laŭdas laŭte ni
per vort' kaj kant'.
Komprenon semas vi,
lingvo internaci'.
Ponton konstruas vi
de land' al land'.

Lingvo internaci',
Fidelaj estos ni
al vi etern'.
Frataron kreas vi
lingvo internaci'.
Pacemajn pensojn vi
homaron lern'.

Lingvo internaci',
promeson donas ni
kun sankta ĵur'.
Vojon nin montras vi
lingvo internaci'.
En korojn metu vi
la senton pur'.

Lingvo internaci',
nun venku ĉiam ni
venku en mond'.
Fortigu kredon vi
lingvo internaci'.
Donu esperon vi
al frata rond'.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Joh.. H: Petersen.

Arg-813-1630 (2013-02-03 10:31:11)

La poemo aperis iam en dana Esperanto-periodaĵo. Estas indikite tie, ke ĝi estas kantebla laŭ la germana kanto "Heil dir im Siegerkranz", kiu estas kantata laŭ la melodio de la angla nacia himno "God save the queen". La aŭtoro estis dana esperantisto.

Joh.. H: Petersen,
Lingvo internacia

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho kara lingvo ci!
Laŭdas vin laŭte ni
Per vort' kaj kant'.
Interkomprenon ci
Semas ja inter ni,
Ponton konstruas ci
De land' al land'.

Ho kara lingvo ci,
Estos fidelaj ni,
kiel fratar'.
Vi ja kunligas nin,
Kore ni amas cin.
Pacon instruu ci
Al la homar'!

Ho kara lingvo ci,
Donas promeson ni
Kun sankta ĵur'.
La vojon iru ni,
Kiun elmontras ĝi
En korojn metu ci
Senton de pur'.

Ho kara lingvo, ja
Regu eterne la
Pac' en la mond'!
Kredu ni ĉiuj ĝin:
Venkos ni je la fin'.
Donu esperon ci
Al frata rond'!

*Traduko de la Esperanta poemo "Lingvo internaci'" de Joh.. H: Petersen en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2008-11-17.*

MR-472-1 / Arg-813-1631 (2013-02-03 10:37:59)

Mi, Manfred Retzlaff, aliverkis la tekston en 2005-11-15; ĉar mi pensis, ke la adjektivan finaĵon "-a" en la vorto "internacia" oni ne rajtas elizii.